

Laborista Esperantisto

16DE JAARGANG No. 2 — 1 FEBR. 1947
VERSCHIJNT MAANDELIJKS
ABONNEMENT ƒ 2.25 PER JAAR. LOSSE NUMMERS ƒ 0.20. VOOR LEDEN GRATIS

Redactie: Middenweg 226, Amsterdam (Oost).
Administratie en Secretariaat van de Bond van Arbeiders-Esperantisten: F. L. E. Postbus 8002.
Postgiro Amsterdam 331133.

ORGAAN VAN DE BOND VAN ARBEIDERS-ESPERANTISTEN F.L.E.
IN HET GEBIED VAN DE NEDERLANDSE TAAL

Leraren M.O.

voor Esperanto

In de voortgezette algemene vergadering van de Alg. Ver. van Leraren bij het Middelbaar Onderwijs in Nederland, heeft de heer H. W. de Koning uit Alkmaar gesproken over het onderwerp „Het wereldtaalprobleem eist een oplossing". Spr.'s betoog kwam in het kort gezegd neer op een krachtig pleidooi voor het Esperanto. De heer de Koning wees er op, dat bij het proces te Neurenberg en op de vergaderingen der V.N. zeer veel tijd en geld verloren is gegaan door het feit, dat alle redevoeringen enz. vertaald moesten worden. Het vertalen geschiedde te Neurenberg weliswaar tezelfdertijd, doch de technische apparatuur was zeer kostbaar. Dit alles zou vermeden kunnen worden, wanneer men een wereldhulptaal ter beschikking zou hebben, welke voor iedereen aanvaardbaar zou zijn, óók dus voor b.v. Chinezen en Japanners. Er is in en na de afgelopen oorlog wel gepleit voor het Engels als wereldtaal, er zijn Engelsen die het z.g. Basic-English in willen voeren, doch aan de hand van vele voorbeelden toonde spr. aan, dat ook dit niet de gewenste oplossing is.

Immers al is de grammatica van het Engels (spr. bedoelde hiermede het standaard Engels) eenvoudig, idioom en uitspraak geven vele moeilijkheden. Bij Esperanto is dit niet het geval; iedereen kan deze hulptaal leren en ondervindt geen moeilijkheden bij de verstaanbaarheid en de uitspraak. In drie minuten gaf spreker de zestien elementaire taalregels, om daarmede te onderstrepen, dat het Esperanto door zijn eenvoud, zijn logica, zijn goede verstaanbaarheid en zijn grote practische bruikbaarheid, boven alle andere talen de voorkeur verdient.

Bovendien noemde spr. het een prachtmiddel om de wereldvrede te helpen bevorderen. Bij de onderwijsvernieuwing behoort ook aan het Esperanto een plaats te worden ingeruimd.

Van verschillende zijden werden vragen gesteld en hieruit *bleek, dat dit vraagstuk ook in de leraarskringen leeft en belangstelling ondervindt.*

(Overgenomen uit „Het Vrije Volk" van 6 Januari 1947 (curs. Red. L.E.).

ESPERANTO BIJ HET M.O.

In de Middelbare Technische School te Den Haag wordt Esperanto onderwezen aan 76 leerlingen, den directeur en drie assistenten.

In het Lyceum voor Schone Kunsten in Gdynia (Polen) werd het esperanto als verplicht leervak ingevoerd.

In Jeruzalem facultatief op de universitaire middelbare school „Beith Hakerem", waaraan 25 leerlingen deelnemen.

Laboristaj Esperantistoj renkontiĝos dum la Paskotagoj en Heerlen

SCIIGOJ DE LA O.K.K.



Ankoraŭ kelkaj monatoj — kaj Pasko alvenos. Kaj kun ĝi nia 28a Kongreso, en la plej suda parto de nia lando. Ĉu vi jam decidis viziti ĝin? Se ne, faru tuj la planon iri al Heerlen je Pasko. Kaj ŝparu. Diversaj sekcioj jam faras tion. En la venonta numero de la L.E. ni verŝajne anoncos hotelprezojn k.t.p. Ni klopodas kiom eble plej multe da gekamaradoj tranoktigi ĉe kamaradoj (esperantaj kaj aliaj). Ni serĉas ankaŭ amasloĝejon (eble lernejon). Kaj por la gekamaradoj, kiuj preferas hotelon, ni luos aŭtobuson. Ĉar en Heerlen mem ni ne povis trovi lokon en la hoteloj kaj devos iri al Valkenburgo, kie, antaŭ la turisto-sezono, estas sufiĉe da loko.

Ĉiu kunlaboru por sukcesigi nian 28an en la katolika Limburgo. Niaj katolikaj samideanoj ĝis nun ne rekomencis ĉi tie sian laboron. Nia Kongreso estu tiom sukcesa, ke ĝi vekos ankaŭ ilin al nova laboro! La O.K.K.

Sekr.: Maastrichterlaan 39, Waubach.

Ĉu ankaŭ vi partoprenas?



Valkenburg: La tri statuetoj.

Taalmoeilijkheden

. . . . zonder eind

In „Even Vastleggen" van December l.l. bespraken we de moeilijkheden, waarmede ook het Congres van het Wereldverbond van Diamantbewerkers te maken had op zijn internationaal congres. Uit het verslag van de zittingen puren wij nog de volgende regels, welke demonstreren hoe gemakkelijk men de taalmoeilijkheden als heel gewoon en onoverkomelijk accepteert. En de miserabele gevolgen op de koop toe!

DE VOORZITTER is verheugd alle Palestijnse delegaties bijeen te zien in deze bijeenkomst apart van de overige delegaties. In het vrije België is nu het Hebreeuws van dode tot levende taal geworden en het gebruik hiervan is het bewijs, dat een nieuwe natie is opgestaan, die haar plaats in het wereldverbond wil innemen. *De taalmoeilijkheden mogen echter geen beletsel vormen voor de besprekingen,* waarin nationale gevoelens en persoonlijke belangen geen rol zullen mogen spelen.

en verder:

Wij moeten ons nu wel afvragen, indien wij de hier aanwezige organisaties uitsluiten: wie vertegenwoordigt Palestina? Daarom ligt de fout bij de Histadruth; Smagarinsky had de zitting niet moeten verlaten, nu heeft men de indruk dat de Histadruth weggelopen is. *Ik veronderstel dat Smagarinsky, die enkel Hebreeuws spreekt, de gang van zaken niet heeft begrepen en daarom een dergelijke houding heeft aangenomen, maar dat zijn nu eenmaal de moeilijkheden van vertalingen.*

Juist; schaf de vertalingen dan af, zodat ge daar althans geen moeilijkheden meer hebt.

Nog eens . . .

de Radiolympus

Heeft de behandeling van onze zaak voor de radio veel stof doen opwaaien onder de ons welgezinde luisteraars, onze beschouwing daarover in L.E. van 1 Jan. l.l. heeft den heer Sam de Wolff niet minder getroffen. Niet zozeer omdat wij hem gebrek aan kennis van Esperanto en de Esperantobeweging verweten, maar wel om onze conclusie vervat in de zinsnede: „Wij moeten hierbij aannemen, dat Sam de Wolff zelfs niet meer ontvankelijk blijkt voor de schoonheid, welke gelegen is in het dienen van een ideaal".
Inderdaad kunnen wij ons voorstellen, dat met deze veralgemening wij de Wolff onrecht hebben gedaan. Meer overeenkomstig de werkelijkheid is, dat de Wolff in deze uitzending geen blijk gaf ontvankelijk te zijn voor de schoonheid van **ons,** d.w.z. der Esperantisten, ideaal.
Nochtans hebben wij goede hoop, dat ook Sam de Wolff, eenmaal attent gemaakt op het grote belang, dat de arbeidersbeweging bij de verbreiding van Esperanto kan hebben, zich aan onze kant zal scharen. Een onderhoud, dat wij met hem mochten hebben, bracht zijn thans voor ons streven gewekte belangstelling aan het licht en tevens zijn waardering voor de schoonheid, ook van ons ideaal. Wellicht, dat men dat van hem te gelegenertijd zelf verneemt.

Uitnodiging

aan de Arbeidersbeweging

Voor het eerst weer na de gruwelijkste aller oorlogen, komen arbeiders uit verscheidene landen van 2—7 Augustus a.s. tezamen in de Deense havenstad Aarhus.
U vakverenigingsbestuurders, partijleiders, redacties van vooraanstaande bladen, die voor en na de oorlog verschillende internationale bijeenkomsten hebt bezocht, weet bij ondervinding wat congressen met buitenlanders betekent. U hebt daarvan meermalen in enthousiaste verslagen en ontroerende brieven getuigd.
Sinds 1939 heeft de wereldbond van arbeiders-esperantisten S.A.T. geen internationaal congres meer kunnen beleggen. Slechts de verbindingen en economische omstandigheden u wel bekend, zullen verhinderen, dat ons 20e internationale congres, als voorheen, bezocht wordt door vele honderden uit alle delen der wereld. Dat het een welgeslaagd congres zal worden, na zoveel jaren van onmogelijkheid met elkaar in contact te komen, daarvan zij men overtuigd.
Voor u die gewend zijt aan internationale conferenties met taalmoeilijkheden zonder eind, zal ons congres van internationale ééntaligen een openbaring kunnen zijn.
Maakt daarom die week vrij voor één uwer bestuurders of redactieleden om een ondervinding op te doen, welke van onmetelijk belang kan zijn voor de ganse arbeidersbeweging.

★ VAN OVERAL ★

HONGARIJE.

In L.E. van November maakten wij melding van de interpellatie in het Hongaarse parlement ten gunste van Esperanto*). Thans lezen wij in „Hungara Esperantisto", dat minister Keresztury afwijzend stond tegenover de interpellatie van den heer St. Csurgay. De ministeriële schriftelijke beantwoording — de minister was inmiddels afgetreden — ondervond critiek in het parlement. Bij de stemming bleken de sociaal-democraten en de communisten de afwijzing van den minister niet te aanvaarden, benevens vele anderen, evenwel niet voldoende om een meerderheid tegen den minister te vormen. Wij hebben zulks niet verwacht. Het feit, dat in het parlement onze zaak ter sprake kon worden gebracht, en althans de arbeidersvertegenwoordigers aldaar het belang er van inzagen, doet het beste verwachten voor de groeiende belangstelling. In het Hongaarse parlement vinden thans drie cursussen plaats voor deszelfs ambtenaren.
In het Min. voor Landbouw wordt eveneens een cursus in Esperanto gegeven voor de ambtenaren van dit ministerie.

*) Het Zaanse dagblad „De Typhoon" nam deze interpellatie in haar geheel op.

Bij de Spoorwegen.

De directie der Hongaarse Staatsspoorwegen gaf de volgende instructie per *Circulaire No. 67, 34, 949/1946 I:*
Wij verzoeken onze chefs de aandacht van het personeel te vestigen op de morele waarde van Esperanto als factor voor de vreedzame betrekkingen en van het belang, dat Esperanto heeft voor het vreemdelingenverkeer. U geve de vakorganisatie of haar gecommiteerden de gelegenheid, tot verbreiding en onderwijs van Esperanto onder het spoorwegpersoneel en werke daar zo veel mogelijk aan mede.

Bij het onderwijs.

In vier Budapester scholen en gymnasiums wordt Esperanto officieel onderwezen gedurende twee uren per week. In het gymnasium van Orosháza wordt wederom Esperanto onderwezen, evenals in het katholieke gymnasium in Nyiregyháza.

TSJECHO-SLOWAKIJE.

Voor de op 17 Febr. a.s. plaats hebbende districtsconferentie in Plzen, werd een voorstel ingediend ten gunste van het gebruik en verbreiding van Esperanto, waaraan de grootste partij in Tsjecho-Slowakije dient mede te werken.
Het Ministerie van Voorlichting geeft een wekelijks bulletin uit ten dienste der krantenredacties.
In enkele nummers komt ook een rubriek voor waarin mededelingen over de Esperanto-beweging. Buitenlanders worden verzocht, geen breedvoerige maar juiste informaties omtrent culturele gebeurtenissen in hun land, te zenden aan het genoemde bulletin (adres: „Kulturni informace", Ĉeĥoslovaka ministerio de Informoj, Departemento VI, Trziŝte 9, Praha III)
De Slowaakse gecommiteerde benoemde een inspecteur voor het Esperanto-onderwijs in de Slovaakse vakscholen. De benoemde is een prof. van de handelsacademie te Bratislava.

ENKONDUKO.

Ĉe la kompilo de tiu ĉi raporto niaj pensoj vole nevole iras al k-do A. Veen, kiu antaŭ sia prezidantiĝo tiom ofte verkis la jarraporton pri nia organizo kaj ankaŭ en sia sekretaria funkcio plenumis tiajn gravajn servojn al nia afero. Lia forpaso estis ne nur doloriga bato por liaj familio kaj amikoj, sed ankaŭ por nia asocio. Veen apartenis al la plej aktivaj kaj plej energiaj laborantoj en nia movado kaj krom tio li posedis multajn ecojn, tre gravajn por la funkcio kaj laboroj, kiujn li plenumis. Lia morto en Aŭgusto pasinta jetas ombron sur nian agadon en tiu ĉi jaro.

Verdire ni entute adiaŭas 1946an kun miksitaj sentoj, ĉar ankaŭ en aliaj rilatoj tiu ĉi jaro ne formis unuunuran serion da sukcesoj. La rezultato de niaj kursoj estis minimuma, sekve de tio la membronombro en Aprilo kaj Majo ne atingis la deziratan alton. Tute certe tion forte influis la malfavoraj kondiĉoj, en kiuj okazis la kursoj. La nevarmigitaj salonoj, la manko de trafikiloj kaj

La kongreso en Alkmaar prezentis efektivan sukceson, al kio multe kontribuis la ĉeesto de kelkaj eksterlandaj kamaradoj el Britio, Danio, Francio kaj Svedio. La sukceso estas malpli direktita eksteren ol internen kaj per tio formis gravan stimulon en nia asocio. Konsiderante ĉion entute, ni devas konstati, ke 1946 estis tre miksita jaro, ni eĉ povus diri „stranga" jaro. Malgraŭ kelkaj esceptoj ni trovis pli favoran akcepton ĉe publikaj kaj organizaj instancoj ol ĉe la granda publiko. Tute kontraŭe al la antaŭmilita situacio, kiam la publiko rilatis al nia ideo multe pli simpatie ol gvidantaj rondoj, kie ni ofte staris antaŭ nevenkeblaj baroj de skeptiko kaj ignoro.

La nuna mondo.

Evidente ni devas serĉi la kaŭzon de tio en la ĝenerala situacio postmilita. En la rondoj de partiaj, sindikataj kaj aliaj organizoj la gvidantoj posedas pli malpli firman opinion pri sia celo kaj ne lasas sin tro forte influi de aktualaj cirkonstancoj.

kontentigan staton kaj por novuloj ĝi prezentis praktikan instruon.

ASOCIA ESTRARO.

La asocia estraro laŭ la elektado en Alkmaar konsistas el: A. Veen, prez. (post lia morto provizore anstataŭgita de F. Faulhaber); W. F. Kruit, sekr.; J. Pouli, kas.; H. W. Alings, red. L.E.; A. v. Haren, vic-sekr.; D. Koeman, vic-kas.; F. de Vries, propagando (nun k-do P. G. v. d. Plank); C. Prins, membro-administracio; H. Velthove, kiu prizorgas diversajn aferojn.

La estraro regule kunvenis dufoje monate kaj krom tio okazis multaj kunvenoj pri specialaj aferoj inter la koncernataj estraranoj.

ASOCIA KONSILANTARO.

La asocia konsilantaro kunvenis unu fojon en Amsterdam antaŭ la Kongreso en Alkmaar. Tiu kunveno pritraktis la raportojn de la konsilantoj pri la agado en la diversaj regionoj kaj la kongresan tagordon.

Aliaj gravaj aferoj estis traktataj per leteroj kaj cirkuleroj.

La konsilantaro konsistas el: A. v. d. Starre, C. Joon (N.-Holl.), G. Kalkman (Z.-Holl.), C. J. Houtekamer (Zeeland), J. Tjenkema (Friesl.), R. Israels (Gr.-Drente), O. Brandsma (Overijsel), J. W. Saaltink (Gelderland), R. Vonk (N.-Brab.), R. Knip (Utr.), J. Sterken (Limb.), F. Willekens, C. de Cock (Flandrio), F. ten Hagen (A'dam), C. v. Essen (R'dam), P. Schwartz (Den Haag).

Konforme al paragrafo 11a, 3a alineo de la Regularo la jenaj k-doj estas nomitaj membroj de la konsilantaro: B. Wels (S.A.T.-peranto), G. J. Degenkamp (Ekz. Kom.), F. G. Kroonder (Libro-Servo Komitato), H. H. Suurmans (Oficejo Esp. ĉe la Instruado).

RAPORTO de La Asocio de Laboristaj Esperantistoj F.L.E. pri la jaro 1946

aliaj malfacilaĵoj, ligitaj al la postmilita situacio, kaŭzis pli ol ordinaran perdiĝon de kursanoj.

Sed ankaŭ la reveno de malnovaj membroj stagnis post la alfluo en 1945. El niaj iamaj 5000 membroj ne revenis eĉ la duono, ĉar necesas atenti, ke inter la nunaj membroj troviĝas pluraj, kiuj dum aŭ tuj post la milito esperantistiĝis. Multaj neniam revenos; el la membroj de la antaŭa sekcio Amsterdam VIII, kiu konsistis ĉefe el judaj kamaradoj, ni revidis neniun. Tamen, ekzistas centoj, kiuj ankoraŭ ne retrovis la vojon returne. Ŝajnus al ni ne malbone, konsideri la eblojn ree altiri al ni tiujn perdiĝintojn, ĉar kvankam ili ne apartenas al niaj plej energiaj kunbatalintoj, ni tamen ne povas permesi al ni la lukson, rigardi tiun parton de nia antaŭa membraro kvanto ignorinda.

Nia bildo pri la pasinta jaro ne estus kompleta, se ni mencius nur la ombrojn, ĉar ankaŭ lumaj punktoj ne tute mankis.

La reviĝliĝo.

En 1946 la kunlaboro de la kvar esperanto-asocioj en la Ned. Centra komitato Esp., NCKE, eliris el la stato de planado kaj projektado kaj konkretiĝis en diversaj entreprenoj.

La Ekzamena Komitato funkciis en sia nova konsisto; NCKE alvokis la neorganizitojn kaj prezentis sin en Utrecht antaŭ la publiko en propaganda kongreso. La rezultato de tiu ĉi kongreso ne montriĝis palpebla sukceso eksteren. Tamen ni atentu, ke la sukceso eksteren ofte ne estas rekte rekonebla sed donacas siajn fruktojn nur post longa tempo.

La oficejo „Esperanto ĉe la Instruado" reprenis sian agadon kaj jam notis kelkajn sukcesojn en la re-aliĝo de kelkaj gravaj neesperantistaj organizoj.

En 1946 ni denove aperis antaŭ la mikrofono kaj eĉ per minimuma peno ĉe la VARA (Unuiĝo de laboristaj radio-amatoroj), kies elsendojn oni alte taksas. Malpli ĝiate iris la regajno de nia pozicio ĉe la Gazetaro. „De Waarheid" (komunista gazeto) akceptas pli malpli regule artikoletojn, sed „Het Vrije Volk" kaj „Parool". (ambaŭ demokrate socialistaj) restis ĝis nun fermitaj, krom kelkaj esceptoj en la regionaj eldonoj.

Internacie niaj rilatoj kun SAT religiĝis kaj en LEA-komitato ni pli malpli regule kontaktas kun la sveda, dana, brita kaj franca frat-asocioj. Kun la ceteraj organizoj en la diversaj mondpartoj niaj rilatoj estas tute suprajaj kaj okazaj.

Kontraŭe ĉe la publiko regas malfido kaj dubemo. La tro granda optimismo el la „neniam-plu-milito"-periodo post la unua mondmilito, cedis lokon al pesimismo, kiu tendencas degeneri en obtuzan fatalismon kaj „ĝuu-la-vivon-ĝis-la-atombombo"-sintenon.

La opinio de la optimistoj, ke estas pli bone, ke la kvereloj kaj disputoj okazu nun en militlaca mondo ol poste en pli normala situacio, kiam la sango kaj ruinoj estos forviŝitaj el la memoro, ne havas vastan adeptaron.

Tamen la amaso denove devas vidi perspektivon, ĉar tia fatalismo kaj rezignacia koncepto malebligas al ĉiu idealisma movado progresi kaj sekve ankaŭ al nia asocio.

Konsiderante tion, ni devas realisme konscii, ke atendas nin kelkaj malfacilaj jaroj, ĉar nur iom post iom ŝanĝiĝos la ĝenerala sinteno. Sed tio ne retenos la konvinkitojn; ili scias, ke malfacilaĵoj devas esti venkataj, ke malfacilaĵoj posedas eĉ fortigan kaj sanigan efikon, kaj ili scias ankaŭ, ke ĝuste en plej krizaj momentoj la firma kaj neŝancelebla espero povos alproksimigi la celon.

La mondo troviĝas nun en stato de ŝanĝiĝo. Ĝi definitive forlasis kelkajn antaŭajn bazopunktojn malgraŭ konvulsiaj baraktoj de la reakcio, sed la mondo ankoraŭ ne trovis la novan apogon, sed tio estas afero de tempo. Nia malfacila, sed bela tasko estas zorgi, ke la nova mondo, kiam ĝi okupos sian novan pozicion, tio estas kiam ĝi definitive suriros la vojon al la socialismo, estu matura ankaŭ por nia ideo kaj ke Esperanto estu uzata, serve al la starigo de pli justa kaj pli paca socio. W. F. K.

KONGRESO EN ALKMAAR.

Nia Kongreso en Alkmaar brile sukcesis kaj fariĝis manifestacio, kiun ĝiaj partoprenintoj plezure rememoris. Ankaŭ laŭ propaganda vidpunkto ni ne povas esti malkontentaj. Certe la ĉeesto de oficialaj reprezentantoj de niaj fratorganizoj el eksterlando kaj la akcepto en la urbodomo multe kontribuis al tio. La ĉeftemon de la tagordo formis la ŝanĝo de federacia en asocian strukturon.

La Kongreso akceptis kun granda plimulto la strukturŝanĝon. Rilate la infanlaboron oni decidis starigi komitaton por esplori la kunlaboron kun la ordinaraj infanorganizoj laŭ propono de Rotterdam III.

Laŭ lingva vidpunkto la kongreso montris

MEMBRONOMBRO.

La membronombro estas je 31-12-'46:

sekciaj membroj	2711
ĝeneralaj membroj	132
simpatiantaj organizoj	5
Entute	2848

En 1946 ni kreskis per 402 membroj.

SEKCIOJ.

En 1946 fondiĝis novaj sekcioj. Estas: Aalsmeer, Schoorl, Zuidlaren, Hoensbroek Lochem, Nieuwe Niedorp, Winschoten, Laren-Blaricum, Goes, Den Helder, Gorinchem, Wijdenes, Zutphen kaj Antwerpen II.

Nia asocio nombras nun 92 sekciojn.

Je 31-12-'45 estis 79 sekcioj; kresko 13.

LABORISTA ESPERANTISTO.

Jam antaŭ la Alkmara kongreso k-do A. Veen petis al mi transpreni la redaktadon de nia gazeto L.E., ĉar mi jam de ĝia starigo prizorgis ĝin ĝis 1937, krom mallonga tempo pro malsano. Mi longe hezitis akcepti la funkcion de redaktoro, ĉar mi jam okupas min pri diversaj alispecaj laboroj dum mi en mia oficejo regule vespere devas kromlabori. La malsano de k-do Veen kaŭzis, ke jam en la kongreso mi, ne preparita, devis okupi min pri la redaktado de L.E.

Mi esperas, ke mi sukcesis trovi la aprobon de nia anaro. Mia deziro estis ke L.E. estu parte propagandcela, destinita por ne-esperantistoj kaj komencantoj, aliparte esperantlingva kun kontentiga enhavo por la F.L.E.-anoj. Ĉar L.E. estas asocia organo, mi kiel antaŭe, celas destini la enhavon por organizaj kaj esperanto-aferoj. Ĉefa afero estas, ke ni per L.E. atingas la laboristajn organizojn, dum ni atendas, ke niaj membroj, same per L.E., atentigas siajn organizo-estrarojn pri la enhavo de L.E. Cetere niaj artikoloj kaj informoj en L.E. celas, havigi al nia anaro materialon kaj argumentojn utiligeblajn en la propagando aŭ por la gazetaro.

Kunlaboro de membroj kapablaj verki por L.E. ĝenerale mankas. *Ĉiujn ne-signitajn artikolojn mi mem verkis*, ankaŭ mi prizorgis la

korektadon. Pro la fakto, ke la redaktoro estas ankaŭ ĉefestrarano, mi havas regulan kontakton kun la estraro.

Bedaŭrinde la papero malboniĝis, pro kio fotoj — cetere tro multekostaj pro la kliŝoj — ne bone aspektas en L.E. Ni sukcesis eldoni L.E. regule kun 8 paĝoj kaj krome specialan prop. numeron. Aperis entute ĉi jare 12 numeroj kun 94 paĝoj.

K-do A. Veen, kies morto, en aŭgusto pas., finiĝis por ĉiam lian kunlaboron al nia gazeto, redaktis la unuajn kvar numerojn.

H. W. Alings.

ABONOJ L.E.

Pro nepago de abonmono kaj manko de varbado ni nun havas nur 90 abonantojn. La membroj ricevas L.E. senpage; geedzoj por ambaŭ 1 ekzn. Nur 5 sekcioj abonis L.E. por publika legejo je la favorprezo de *f* 1.— jare. Kial ne ĉiuj sekcioj zorgas, ke en la loka legejo troviĝas nia gazeto? Ĉu ili ne scias, ke tia abono nur *f* 1.— kostas?

Ne pli ol 25 sekcioj abonigis 335 kursanojn je L.E. por la favora duonjara kursabono. 24 F.L.E.-amikoj pagantaj kotizon pli ol la abonprezo ricevos senpage L.E. 64 ekz. ni sendas regule al nederlandaj instancoj, redakcioj k.t.p. kaj ni interŝanĝas L.E. kun proks. 60 eksterlandaj gazetoj k.c. H.V.

F. L. E.-AMIKARO.

Kiam ni fondis la fakon F.L.E.-amikaro, ni opiniis, ke ne estos malfacile al nia membroj kolekti po proksimume 10 simpatiantojn por nia asocio. Kia seniluziiĝo nun, kiam post ĉirkaŭ 9 monatoj oni sukcesis varbi **nur 1½ milojn** da simpatiantoj anstataŭ la esperatan 250 0!

Speciale Amsterdam plorinde elstaras. Rotterdam kompare malpli malbone streĉis sian povon. La sekcioj Rotterdam II kaj V, varbis preskaŭ 600, do pli ol ⅓ de la tuta F.L.E. amikaro! En distrikto Friesland, la ĝenerala membro,k-doBerduŝek sola varbis 94 amikojn! Kial tio ne eblas al la aliaj membroj? Ja ne estas malfacile inter parencoj, konatoj, klientoj en oficejoj kaj fabrikoj paroli pri Esperanto kaj varbi minimume 10 simpatiantojn al nia F.L.E.-amikaro? Ni mem spertis kiel facile estas.

Ĉu oni ne komprenas la kialon pri la ekzisto de F.L.E.-amikaro? La ĉefaĵo ne estas la enkasigado de multe da mono. La jarkotizo de *f* 0.25 ne riĉigos nin. Tio, kion ni bezonas estas granda, grandega nombro da simpatiantoj. Ni povu montri al la ekstera publiko: jen, jam tiom multe da personoj subtenas nin. Ja ankoraŭ tro malgranda nombro da Esperanton-parolantaj personoj ne sufiĉos por konvinki la publikon.

Tial ni ankoraŭ forte instigas la sekcioestrarojn kaj niajn membrojn individue, streĉi sian povon por varbi F.L.E.-amikojn, el propaganda vidpunkto. Pli valoras miloj da F.L.E.-amikoj, pagantaj po *f* 0.25 ol kelkcentoj pagantaj 1 aŭ pluraj guldenoj. Diversaj sekretarioj sendis la neĝustajn slipojn kaj pro tio kaŭzis nenecesajn laboron kaj elspezojn de afranko.

En la komenco de sept. ni havis 335 amikojn kaj fine de okt. 1095. Kaj 1672 je la fino de dec. 1946.

Partoprenis la varbadon nur 35 sekcioj kaj 5 distriktoj. La jenaj sekcioj varbis 2 aŭ pli da F.L.E.-amikoj po ano, nome Amersfoort 1,4, Andijk 20, IJmuiden 42, Rotterdam II 334, Rotterdam V 258 (= po ano 6) kaj Winterswijk 27. Den Haag havanta proks. 70 anojn varbis 123, sed Amsterdam nombranta ĉ 540 anojn varbis nur 63. La tuta kotizo (parte por la sekcioj kaj distriktoj) sumiĝas jare *f* 801.—. Ni demandas, kie restis la senditaj varbiloj kiuj ne estas uzitaj? Ĉu oni forgesas, ke la presaĵoj nuntempe estas tre multekostaj?

Ni interkonsentu, ke la sekcio-estraroj informiĝu ĉe la anoj kaj en okazo, ke oni ankoraŭ ne komencis la varbadon, tion tuj faru, por ke en la kongreso ni povu anonci imponan ciferon. H.V.

EKZAMENA KOMITATO.

La asocia estraro nomis k-dojn F. Faulhaber, G. J. Degenkamp kaj W. F. Kruit membroj de la Ekzamena Komitato por F.L.E. Kiel helpekzamenantoj por F.L.E. estas nomitaj: J. v. Scheepen, G. P. de Bruin, H. Kuyt, W. H. v. Lier, B. Wels, C. J. Coppens, J. W. Prent, P. Schwartz, H. Bank, R. Israels, F. Munniksma, J. Lem, H. Velthove, A. L. de Bruyn, H. Oudenhooven—Bishoff, J. Tjepkema, H. W. Nieweg, J. W. Slotegraaf.

Ne ĉiuj nomitoj estis alvokataj por la ekzameno, ĉar tio dependas de la nombro da kandidatoj kaj la distanco inter la urboj. Plie kelkaj ekzamenantoj ne povis sin liberiĝi por la sabataj ekzamenoj.

RADIO.

Vara invitis nin por parolado antaŭ la mikrofono je la 9a de Febr. 1946. K-do Veen plenumis la taskon kaj el tiu kontakto baldaŭ denove formiĝis nia kunlaboro kun Vara. Ek de Aprilo ni havas ĉiumonate prelegon pri aŭ en Esperanto. Ni esperas, ke ni ĉiatemp atingos pli multe.

Vara nun plene pagas la programojn kaj parolantojn. Sekve de tio la propagando per la radio kostas al nia asocio neniom.

Kunlaboris en la programoj:

K-doj A. Veen, G. J. Degenkamp, B. Wels, J. L. M. Visser, R. Israels, H. Suurmans. W. F. Kruit, A. L. de Bruyn kaj Mr. A J. Kalma.

En Septembro Vara faris radio-raporton pri la NCKE-Kongreso en Utrecht, same kiel en Aprilo pri nia Kongreso en Alkmaar.

Kial ne ĉiuj membroj partoprenis en la varbado por la F.L.E. AMIKARO? Por nur 25 cendoj jare, viaj konatoj kaj kolegoj grave subtenas morale nian movadon.

PROPAGANDO.

Ĉe la preparo de propagandiloj, renkontiĝis multaj malfacilaĵoj. Ĉiam retenis nin manko de papero kaj aliaj materialoj, ĉefe bezonataj por la propaganda fako.

Eliris en:

Majo	100.000	flugfolioj
Julio	220.000	,,
Septembro	245.550	,,

Cirkulero „Intellectuele Bagage".
Afiŝo „Gaat met uw tijd mee".

Kaj reeldonoj:

Broŝuro „Esperanto juist nu!" de A. v. Haren.
Afiŝo „Sloopt de Taalmuren".

Al multaj estraroj de partioj kaj sindikatoj ni sendis propagandan materialon. Al la delegitoj en la kongresoj de N.V.V. kaj E.V.C. ni havigis, resp. 450 kaj 600 pakaĵojn. Al la delegitoj en la Internacia Kongreso de Eks-Politikaj Kaptitoj en tempo de la Okupado ni sendis 800 cirkulerojn 13-lingvajn. Al la rekonstrua oficejo en Rotterdam-„ASRO"; la Registara Informado Servo en Hago kaj al la Oficejo: „Propagando" de la Amsterdama komunumo ni proponis nian helpon por traduki la de ili eldonitajn broŝurojn esperantlingven. Sed sen rezultato.

Ekspozicioj.

Nia ekspozicia materialo estis malnova kaj eluzita.

Bonege asistis nin en tio, k-do W. Borsje el Rotterdam kaj k-do H. Mittendorf Jr. el Amsterdam. Ili desegnis kaj faris novajn aranĝojn, kaj pro tiu helpo ni sukcesis iom efektiviĝi niajn intencojn.

Ni ricevis propagandan materialon el Francio, Svedio kaj Brazilio, el kiu ni povis sendi iom al diversaj sekcioj kaj distriktoj. Tamen la ekspozicioj estas ne tiaj, kiajn ni deziras.

Gazetarservo.

Kelkfoje aperis en L.E. raportetoj pri ĉi tiu Servo. Montriĝas, ke jam multaj gazetoj aperigis niajn novaĵojn.

En Marto ni sendis al ĉiuj gazetoj kaj periodaĵoj instigan leteron por enpresigi niajn sciigojn. Sed ĉiam la respondo estis sama: Spacomanko!! Antaŭ kaj post nia Kongreso en Alkmaar ni sendis denove. Kaj nun kelkdekoj da gazetoj kaj periodaĵoj menciis nian kongreson kaj aperigis nian raporton. Ankaŭ pri la propaganda Kongreso en Utrecht ni ricevis multajn eltondaĵojn.

En la komenco de la jaro ni eldonis la unuan folion de nia Dokumento-Servo. Bedaŭrinde ni ne povis efektiviĝi nian intencon eldoni plurajn. Multaj malfacilaĵoj devis esti venkataj. Kaj kiam ili estis venkitaj k-do F. de Vries malsaniĝis.

El aliaj landoj ni ricevis same interesajn gazeteltondaĵojn. Kaj kun Belgio, Danio, Francio kaj Svedio ni havis amkajn rilatojn.

Statistikoj.

Trifoje en ĉi tiu jaro ni aranĝis statistikojn. Kaj trifoje multaj sekcioj ne sciis sian devon. Por akiri bonan impreson pri nia Asocio statistikoj estas nepre bezonataj. Malsufiĉe da respondoj senvalorigas la respondojn kaj la penon de la aliaj sekcioj.

Prelegvojaĝa Servo.

Ĝis nun ni ne sukcesis inviti eksterlandanojn. **Anoncis sin 6 membroj por prelegi en niaj** sekcioj. Sed unue pro troa okupiteco, poste pro malsano de k-do de Vries, ni ne povis fiksi skemon por tiu laboro. F. de V.

KARTOTEKO.

Jam plurfoje sentiĝis la bezono pri klare transvidebla kartoteko, el kiu ni povus ĉerpi la necesajn informojn por propagandaj celoj. Nur en la fino de la somero ni sukcesis komenci tiun ĉi laboron, kiu same por sekcioj kaj distriktoj posedas gravajn avantaĝojn. Ni sendis al ĉiuj sekcioj kaj distriktoj kvanton da membrokartoj, por ke ili havu kartotekon konforman al la asocia.

Por havigi al ni la bezonatajn informojn necesis presigi milojn da demandaroj, kiuj ĝis nun nur gutgute revenas. Oni komprenu, ke sen tiuj informoj ne eblas konstrui taŭgan kaj utilan aparaton. Kelkaj sekcioj ĝis nun eĉ ne resendis la demandlistojn. C.P.

BIBLIOTEKOJ.

Ni komencis prepari kelke da vojaĝantaj bibliotekoj. En L.E. ni petis kestojn por ekspedi la librojn. Ne venis respondo.

Ni denove fondis asocian bibliotekon. En ĝi restos ekz. de niaj propraj eldonaĵoj kaj de la libroj, kiujn vendas la L.S. Plie la libroj, ricevitaj por recenzo. Jam nun ni havas modestan kvanton da libroj.

Por studoceloj ebłos prunti iajn verkojn, kontraŭ pago de la ekspedokostoj Kiom eble plej baldaŭ ni pretigos katalogon. H.V.

TEATRAJOSERVO.

Ĉar nia antaŭmilita stoko preskaŭ tute eluzpiĝis, restis nur kelke da malmoderniĝintaj teatraĵoj.

Ni ricevis du taŭgajn manuskriptojn, sed ne eblis ĝiate funkcii ĉi tiun servon pro manko je stencilpapero k.t.p.

Ni do apenaŭ povis helpi kelkajn sekciojn. Ĉijare ni espereble sukcesos akiri materialon por multobligi kelkajn teatraĵojn. C.P.

L.E.A.-KOMITATO.

En L.E.A.-Komitato nia Asocio estas reprezentata de k-doj Kruit kaj v. Haren (antaŭe A. Veen).
La Komitato ĉefe pritraktis la bazon de sia konsisto kaj la formon de sia agado. La kernon de la komitato formas nun dana, sveda, brita, franca kaj nederlanda L.E.A.-oj kaj S.A.T.
Ĉar la komitato ankoraŭ troviĝas en la komenca periodo, ne povas jam esti parolo pri definitivaj rezultatoj, sed pli intimaj rilatoj inter la koncernataj asociaj jam reliefiĝas.

N. C. K. E.

Fondita je la 22a de dec. 1946a, N.C.K.E. komencis sian agadon praktike nur en 1947a. En februaro eliris alvoko al la neorganizitaj esperantistoj, aliĝi al unu el la kvar asocioj, laŭ sia prefero por plifortiĝi la movadon.
La ĉefan laboron formis la preparoj por la komuna propagando-kongreso kiu okazis je la 7a de Sept. '46a en Utrecht.
Kvankam estas malfacile sondi la rezultaton, ni tamen povas konsideri ĝin sukceso. La kongreso demonstraciis la eblon de fruktodona kunlaboro en komuna afero.
En la honora kaj rekomenda komitatoj eksidis diversaj konataj kaj eminentaj figuroj el ĉiuj tendencoj. V.A.R.A. prizorgis radio-raportadon kaj per tio multe kontribuis al la diskonigo de la kongreso. La rikolto en la gazetaro ne estis kontentiga. Inter la vizitantoj troviĝis reprezentantoj de diversaj gravaj organizoj. Okaze de la Utrechta kongreso eliris faldfolio „Wat zeggen zij over Esperanto?" eldonita de N. C. K. E.

LITERATURA KOMITATO.

La laboro de nia komitato ne tute stagnis dum la pasinta milito. Ĝi kontrolis en tiu tempo du manuskriptojn, nome „La nevenkebla ĝeno", tradukon de „Het taaie ongerief" de Theo Thijssen, kaj „Kaŭĉuko", tradukon de „Rubber" de M. Szekely—Lulofs, faritajn resp. de F. Faulhaber kaj G. J. Degenkamp, kaj eldonotajn de S.A.T. kaj F.L.E.
En 1946 ĝi kontrolis la unuan eksterlande eldonotan verkon „Pli ol fantazio" de Agnes Bögh—Hogsted, tradukitan de C. Graversen.²) Plie ĝi kontrolis tradukon de nederlandlingva libro por infanoj, aperontan ĉe privata eldonejo.
Ĉi momente ĝi kontrolas la propran eldonon „Ni kantu!" por ke ĉi tiu kantaro povu reaperi korektita, post kiam la nuna stoko elĉerpiĝis.
Anoj de nia komitato nun estas:
L. Friis (danlingvano); M. Dessoit (franclingvano); E. Faulhaber—Ĉiŝkovská (ĉeĥlingvano); G. J. Degenkamp, A. Kloek, J. van Scheepen kaj F. Faulhaber (nederlandlingvanoj).
Helmi Dresen (estonlingvano), kiu kontrolis kelkajn librojn el nia unua romanserio, estis — laŭ sciigo el Danio — pafmortigita de Gestapo. Danke ni memoras ŝiajn afablajn konsilojn.
La utilon de kontrolado oni ankoraŭ ne sufiĉe komprenas. Nia sperto akirita dum nia kelkjara laboro tamen instruis al ni, ke eĉ plej kapabla esperantisto agus bone kontroligante sian verkon.
Ni atentigas, ke nia Literatura Komitato akceptas manuskriptojn por kontrolado, nur se eldonisto deklaras sin preta eldoni ĝin.

F. Faulhaber.

JUNULARKOMITATO.

Laŭ instigo de la asocia estraro kunvenis la 14an de septembro 1946 en Amsterdam; la k-doj Korff, Hinrichs, Bossong kaj Bakker kun la estraranoj v. Haren, Velthove kaj de Vries.
Ili fondis junularkomitaton, kies celo estu: agrabligi la membrecon de la junaj membroj en la aĝo inter la 16a kaj 25a jaroj, por ke ili sentu sin pli ligitaj al la Asocio.
Le celon la komitato atingu per organizado de semajnfinoj, tendumaroj k.t.p. en kiu laboro ĝi agu memstare. La komitato elektis estraron: k-don Hinrichs prez., k-don Bakker sekr. K-do Bossong okupos sin pri la fondota ŝparinstanco kaj k-do Korff pri kolektado de eksterlandaj adresoj, por formi korespondo-centron.
Alvoko en L.E. ne estis kotentiga. Pro tio la kom. kunvenis en Amsterdam, la 24an de nov. K-do v. Rijn (Halfweg) ĉeestis kaj k-dino T. Wey. K-do v. Rijn estis elektita kiel dua prez. kaj k-dino Wey kiel dua sekr./kasistino. Oni decidis organizi semajnfinon en la junulargastejo en Haarlem por la distriktoj N. kaj Z. Holland kaj Utrecht.
Ĝi okazis la 14an kaj 15an de decembro. Ĉeestis entute 14 personoj, sed evidentiĝis, ke inter la gejunuloj vivas la forta deziro labori por la Asocio. Tamen en multaj sekcioj ilia voĉo perdiĝis en tiuj de la malpli junaj membroj.
En la pasko-kongreso okazos ĝenerala kunveno por definitive starigi la laboron.

Ŝparsistemo:
La sekr. akiris de la Rijkspostspaarbank ĉiun kunlaboron, se sufiĉe da partoprenantoj anoncos sin.

Membronombro:
La 31an de dec. la membronombro estis 47. Ĉar la membroj estas ankaŭ membroj de la Asocio, ili ne pagas specialan kotizon al la junularkomitato.

Financoj:
La elspezoj ĝis 23 dec. estis entute *f* 31.18. La *f* 8.04 deficito Haarlem kaŭziĝis pro la alta prezo de la gvidantkartoj, necesaj por uzi la junulargastejon. Sed ili validas la tutan jaron.

Internaciaj rilatoj:
Kontakton ni akiris kun la franca Junularkomitato, kies bultenon ni regule ricevas. La sekr. kunlaboras en la internacia Junularkomitato, formita en la kadro de S.A.T., La kontakto kun la nomita komitato estas bona, same kia kun la sveda jun. kom. K-do v. Rijn esploras la eblecon de interŝanĝado de gejunuloj en la ferio, kunlabore kun la franca

Ĝenerala impreso:
1947 donos al nia komitato multe da laboro. La nura zorgo estas, ke en diversaj distriktoj kaj sekcioj nia laboro ne estis ĝoje akceptata. Ŝajnas, ke inter la membroj kelkfoje regas la opinio, ke nia laboro estas superflua. Sed sen la kunlaboro de iuj, nia laboro perdas multon de sia valoro.

P. Bakker.

KOMITATO ESPERANTO ĈE LA INSTRUADO:

En tiu ĉi komitato k-do Suurmans el Haarlem anstataŭis k-don Kruit.
La komitato ne estis tiom aktiva kiom ĝi devus esti, pro la fakto, ke ĉiuj anoj de la komitato dronas en alia laboro por Esperanto. Ĝi kunvenis ĉijare nur trifoje.
Dum la milito perdiĝis la posedaĵoj de la komitato.
La Amsterdama urbestraro malakceptis la peton instrui Esperanton po du horoj semajne en la lerneja tempo. Ni tamen daŭrigu tiun agadon, ĉar en Anglio pli ol kvindek lernejoj instruas nian lingvon dum la lernejaj horoj. Klopodoj ĉe la „Vernieuwingsraad voor het Onderwijs" por enkonduki estontece Esp. ĉe la instruado ne havis rezultaton. En la Mezlernejo Esp. povas esti instruata laŭ Art. 16a de la „Leĝo pri la Mezlerneja Instruado". Praktikaj gvidlinioj por la enkonduko en la lernejoj estas necesaj. Ili estos preparotaj.
La dua kunveno okupis sin per la serĉado de nova prezidanto aŭ direktoro. La komitato ankoraŭ ne trovis solvon, sed la nuna prezidanto s-ro Baas, ne povas resti.
Rilate la renovigon de la leĝo pri la Instruado, la komitato decidis, ke du aŭ tri anoj vizitu la ministron por pledi pri nia afero. Kvankam la tuta ĉeestantaro opinias, ke ni povas komenci la instruadon en la kvina klaso, ni, pro praktikaj kialoj petos komenci en la sepa studjaro. La B-diplomo estu necesa por la instruado, ankaŭ por profesiaj geinstruistoj
Pere de la „Nederl. Ouderraad", (Nederlanda gepatroj-komisiono), kiu estas ano de nia komitato, ni klopodos varbi la gepatrajn komisionojn de la diversaj lernejoj por nia afero. La „Ned. Ouderraad" volonte disponos por tio lokon en sia periodaĵo.
En kunlaboro kun la diversaj Esp. Org. la komitato eldonis novan broŝuron por Esp. en la Lernejo.

H. H. Suurmans.

Kiu deziras ricevi dum la tuta jaro la internacian gazeton „Sennaciulo", tuj aliĝu al S.A.T.

KOMITATO ESPERANTO ĈE LA JUNULARO.

La okan de julio 1946a fondiĝis la komitato, kiu esploros la eblon kontakti kun la junularorganizoj, por ke ili akceptu Esp. en sian programon.
La komitato konsistas el k-do W. Borsje, Rotterdam, k-dino C. Rijpstra-Timmermans, Leeuwarden kaj k-do H. H. Suurmans, Haarlem. La lasta fariĝis sekretario de la komitato.
La 20an de julio la komitato unuafoje kunvenis por decidi pri laborplanoj kaj preparoli la gvidliniojn, prezentitajn de la Asocia Estraro al la konsilantaro. Pro familiaj cirkonstancoj k-dino Rijpstra ne povis ĉeesti.
La 21an de Julio la komitato sendis amplekssajn leterojn al la ĉefestraroj de A.J.C. kaj A.N.J.V. en kiuj ni skizis la utilon kaj neceson de internacia lingvo por la junularo kaj montris la plej taŭgan vojon por akiri bonajn rezultatojn. Post kelkaj atentigaj leteroj ni ricevis meze de septembro la sciigon de A.J.C., ke en Amsterdam jam fondiĝis kelkaj kursoj kaj ke ĝi estis aktiva en diversaj aliaj grandaj urboj.
A.N.J.V. fine respondis, ke la ĉefestraro ĉivintre ne mem organizas la klerigan laboron, sed tiun taskon transdonis al la sekcioj. Ĉiu sekcio mem organizas la vintrajn kursojn. La ĉefestraro do mem ne povas enkonduki Esp. en la programon, sed ĝi promesis al ni atentigi la diversajn sekciojn pri la eblo akiri kursgvidanton de nia Asocio.
Ke la kontakto kun la A.N.J.V. estas firma kaj ke tiu organizo komprenas la valoron de Esp. montriĝis el la fakto, ke ĝi propraniciative proponis al ni lokon en ekspozicio okaze de sia kongreso en la fino de decembro. Tiun ekspozicion prizorgis la Amsterdama Distrikto.
La komitato interkontaktis ankaŭ kun V. C. J. C. (Vrijz. Chr. Jeugd Centr.) en Utrecht kaj kun D. S. J. V. (Dem. Soc. Jong. Ver.) „De Nieuwe Koers". En la periodaĵoj de ambaŭ ni sukcesis meti artikolon, kaj en ĉefestrarkunveno de la lasta organizo ni buŝe povis pledi por la studo de Esp. en junularorganizoj.
Kvankam la rezultato de nia laboro ne estas tiom granda kiom ni deziris, ni tamen fondis la kontakton kaj venontjare povos komenci en la tempo antaŭ kiam la diversaj organizoj fiksas la vintroprogramojn. Tiam ni verŝajne akiros pli gravajn rezultatojn.

H. H. Suurmans.

Antwoord aan N.K.

De bondsvoorzitter van „Nederlanda Katoliko" komt in zijn bondsorgaan terug op ons artikel „S.A.T. en de nationale talen" in L. E. van Dec. '46, opmerkende, dat op oefeningsavonden wel, doch in „zakelijke" bijeenkomsten als jaarvergaderingen, speciale commissiebijeenkomsten enz. van N. K. geen Esperanto gesproken wordt.

Inmiddels haalden wij in ons vorig nummer Dr. Zamenhof aan ten bewijze, dat niet alleen de aanhangers van S.A.T. bij voorkeur steeds Esperanto spreken.

Wij merkten reeds op, dat zulks ook gewoonte is in onze bond Fa L. E. en, laten wij er aan toevoegen, onze correspondentie wordt onder esperantisten in het Esperanto gevoerd.

Wij deden uitkomen, dat de heer De Jong, de bondsvoorzitter van N. K., onjuist handelde, door in een in het Nederlands gesteld artikel, te beweren, dat de aanhangers van S.A.T., hetgeen meer uitdrukt dan enkel leden van S.A.T., de verwijdering der nationale talen voorstaan, en wij karakteriseerden dit met domme en schadelijke argumentatie, als ze niet bedoeld is om kwaad te spreken. Daar hebben we onze goede redenen voor en gierig te weten, wie de redacteur is van ons orgaan, omdat hij liefst met open vizier strijdt. Wij willen het den heer de Jong niet lastig maken, door hem te verwijzen naar het verslag van ons Alkmaarse Congres, waar H. W. Alings tot bestuurslid en redacteur werd verkozen, een functie die hij ook verscheidene jaren, te beginnen met het eerste nummer van L.E., voor de oorlog vervulde. De heer de Jong mene nochtans niet, dat hij tegen een, zoals hij het uitdrukt, naamloze postbus 8002 spreekt, ook niet enkel aan het adres van den redacteur, dat niet genoemde postbus is, vide de kop van L. E. De redacteur geniet uiteraard het vertrouwen van bestuur en leden, is spreektrompet van beide en als bestuurslid kent hij de meningen en opvattingen in onze F.L.E. En die zijn breed genoeg, om ook in L. E. op te nemen, hetgeen in andere kringen leeft. **Een dergelijke houding ontmoeten wij te onzen aanzien maar al te weinig.** De redacteur van L. E. heeft er geen behoefte aan zijn naam in de kop van het blad te vermelden, noch in te gaan op het verzoek van den heer de Jong, om wat meer zijn artikelen te ondertekenen. Laat het hem genoeg zijn te weten, dat **alle** niet ondertekende artikelen en informaties etc. in L.E. zijn van de hand van den redacteur, zoals algemeen gebruikelijk **is**. Doch waar wij bij voorkeur **gezamenlijk strijden vóór Esperanto,** zou ons niets liever zijn dan „geschillen" onder ons in het Esperanto te behandelen en naar buiten op te treden als een eenheid. Uw heilwens aanvaardend, eveneens Prosperan Novjaron en la intereso de nia komuna afero. En voor deze keer ondertekend door

LA DANOJ ATENDAS VIN ĈI SOMERON EN LA 20-A S.A.T.-KONGRESO kiu okazos de 2-7 Aŭgusto en Aarhus, Danio.
Anoncu vin al kdo C. van Essen, Floretstraat 10, Rotterdam-Zuid.

dan is het niet oirbaar van den heer de J., om te vragen of de schrijver hier soms lasteren bedoelde! De redacteur van L. E. bedoelde niets, doch meende terecht te moeten waarschuwen, om niet bij het publiek een mening te doen postvatten en ook niet bij de leden van N. K., welke schade zou kunnen doen aan onze gezamenlijke propaganda voor Esperanto.

In het verleden hebben we meermalen ondervonden, dat bij velen een verkeerde mening omtrent Esperanto heerste en niet voor niets spreekt de verklaring in de tot de U.N.O. gerichte petitie van „.....een wereldhulptaal, welke dient tot aanvulling van de nationale talen, **maar niet tot vervanging daarvan...**"

De aanhangers van S.A.T. vormen in Nederland een respectabele groep. Reeds is gezegd, dat ook in „zakelijke" bijeenkomsten van onze bond Esperanto wordt gesproken. Door te schrijven als de heer de Jong deed, wordt de indruk gevestigd dat dus de arbeidersesperantisten de verwijdering der nationale talen voorstaan. En waar dit van onze leden en ook niet van alle S.A.T.-leden gezegd kan worden, dienen zulke beweringen achterwege te blijven. Ten hoogste is het een academisch vraagstuk en zeker een interessante stof waaraan niet alleen S.A.T.-anoj maar ook anderen hun hart kunnen ophalen. Dat S.A.T. weigerde mede te werken aan het I.E.L. petitionnement, doet niets terzake. Als de heer de Jong enkel geschreven had, dat de S.A.T.-aanhangers bij voorkeur Esp. spreken, (maar dan had hij niet de tegenstelling tot zijn leden moeten suggereren door de woorden „alleen de"), dan zou hij niets miszegd hebben, doch was alleen de aanvulling nodig geweest; **en duizenden anderen met hen.** De heer de Jong, voor wie de Esp. beweging toch niet nieuw is, moet dat toch weten. Als uit zijn pen dan de „beschuldiging" vloeit, dat zij dit doen omdat zij de verwijdering der nationale talen voorstaan, mag hij ons toch niet verwijten, dat wij het alternatief domme en schadelijke argumentatie of kwaad spreken, gebruikten.

Tenslotte: de N. K. voorzitter is nieuws-

H. W. Alings, Red. L. E.

7 Januari 1947.

1000 — 1500

En la regiono de la Nederlanda lingvo S.A.T. kreskis post la milito pli rapide ol antaŭ ĝi.
En la F.L.E. kongreso en Alkmaar mi povis anonci la 1000an membron.
Ĝis nun tiu nombro plialtiĝis ĝis 1250. Zorgu, ke en nia kongreso en Heerlen mi povos anonci la 1500 an! Tio estas ebla!

F. Faulhaber, prezidantos
de Asocio de Lab. Esp. F.L.E.

ESPERANTO KAJ LA LABORISTA MOVADO.

En julio 1946a mi sendis por-Esperantan artikolon al la redakcio de „De Bouwer", organo de la Alg. Ned. Bouwarbeidersbond. Mi vizitis la kongreson de ĉi tiu organizo kaj aŭskultis la paroladojn de diversaj eksterlandaj delegitoj. En mia artikolo mi komparis tiajn kongresojn kun niaj Esperanto-kongresoj. Mi ankaŭ aludis la paroladon de Kupers en Moskvo. Tamen ĝis nun la artikolo ankoraŭ ne aperis.

Ne nur mi informu la redakcion de „De Bouwer" pri Esperanto. Ja mi ne estas la ununura Konstrulaborista Esperantisto. Tial mi instigas la k-dojn, anoj de la Alg. Ned. Bouwarb. bond, sendi artikoletojn kaj leterojn k.c. pri Esperanto al la Redakcio de „De Bouwer".

Konvinku la redakcion pri la ekzisto de Esperanto. H. W. Altena.

Starigo de F.E.R.N.

En Utreĥto, la 14an de nov. 1946, kunvenis fervojistaj Esperantistoj el diversaj lokoj de nia lando por starigi tutlandan rondon de fervojistaj Esperantistoj. La salono, kiun bonvole disponigis al ni la direkcio, estis preskaŭ plena.

Kiel gastoj ĉeestis la ĉefinspektoro s-ro S. Heyers, Mr. A. Kalma kaj k-do A. van Haren. La prez. de la starigkomitato, k-do W. Stapel klarigis Esperantlingve en sia malfermparolado la celon de la starigota rondo, kiu estas tre simpla, nome:

1e. Disvastigi Esperanton inter la gefervojistoj.
2e. Instigi tiujn fervojistojn kaj iĝi ilin subtenantoj, spirite kaj mone, kiuj iel ajn ne Esperantiĝos, sed havas por nia idealo varman koron,
3e. Organizi eksterlandajn vojaĝojn, por ke ni reciproke sciiĝu pri la vivnivelo de malsamlandaj kolegoj, sed ankaŭ pri iliaj laborkondiĉoj, salajroj, k.c.
4e. Organizi, kio ne estas malpli grava, landajn kolektiĝojn.

Ne estas la celo de F.E.R.N. formi organizon en organizo. Ĉiu membro restu ano de sia propra Esperanto-organizo, eventuale fariĝu tio, ĉar ne estas la tasko de F.E.R.N. okupi sin pri la instruado. Nur en lokoj kie ne estas sekcioj de Esperanto-organizoj, ni mem aranĝu kursojn.

Salutis la kongreson nome de F.L.E. k-do F. van Haren, nome de L.E.E.N. Mr. A. Kalma kaj nome de la fervojdirekcio s-ro S. Heyers. La plej grava punkto de la tagordo estis la elekto de la definitiva estraro. La provizora estraro deziris, ke ĝi estu en Utreĥto, kion la Utreĥtanoj akceptis. Fariĝis prezidanto k-do C. A. Broekman, sekretario G. G. v. Veldhuizen, Cremerstraat 166 kaj kasisto J. A. Vermaak, membroj J. J. Labordus kaj H. Bekker.

Elektiĝis propagandkomitato sub gvido de k-do J. J. Labordus.

Kun komuna kantado de „La Espero" la bone sukcesinta kunveno finiĝis. H. Hoen.

Terkulturo kaj Agronomio

Iniciate de U.E.F. (Unuiĝo de Esp.-istoj en Francujo) estas starigita „Faka sekcio por Terkulturistoj kaj Agronomoj", kun jenaj celoj:

a. Grupigi la Esp-istajn kamparanojn, vegetaranojn kaj interesitojn pri kampkulturo.
b. Kolekti nomojn kaj adresojn de eksterlandaj samfakaj samideanoj kaj por disponigi al la membroj, kiuj deziras korespondi aŭ vojaĝi eksterlanden.
c. Starigi kampkulturan terminaron. Fondi internacian fakorganizon, se eble kun propra gazeto.

Tio dependas de vi, agronomoj, agrikulturistoj, ĝardenkulturistoj, brutbredistoj kaj ĉiuj, kiuj iamaniere havas intereson pri tiuj fakoj. Aliĝu al la nederlanda fakgrupo! La kotizo por 1947 estas *f* 3.—.

Ne prokrastu! Skribu tuj al la provizora fakestro por Nederlando:
Jac Smit, J. Pz. Coenstraat 13, Hoorn (N.H.).
Poŝtĝiro 188777.

Abonneert U thans op ons studieblad
LA PROGRESANTO
met vertaalrubrieken voor beginners en gevorderden, artikelen over grammatica, literatuur en actuele taalonderwerpen, benevens een taalkundige vragenbus. *f* 1.75 p. jaar, voor leden 1.25.
Adm. Postbus 8002, Amsterdam-W.



MEDEDELINGEN BONDSBESTUUR

Prosperon kaj feliĉon deziras la estraro al nia membraro, kiun ĝi reciproke dankas pro la ricevitaj bondeziroj por 1947.

Verkiezing Bestuur.

Wij vestigen er nog de aandacht op, dat vóór 1 Maart tenminste 9 candidaten gesteld moeten worden. Van het thans zittende bestuur stellen zich 8 weer herkiesbaar. Daar kdo A. v. Haren candidaat is voor het voorzitterschap (in de vacature A. Veen, tot het a.s. congres waargenomen door F. Faulhaber), komt de functie van 2e secretaris vrij, waarvoor bij voorkeur iemand als cand. gesteld worde die het machineschrijven verstaat en in Amsterdam woonachtig is.

Amendementen.

Congresvoorstellen worden gepubliceerd in het 1 Maart-nummer van L.E. Amendementen dienen uiterlijk 10 Maart in het bezit van den bondssecretaris te zijn.

Vergadering van de Bondsraad.

De bondsraad komt bijeen op 22 en 23 Maart a.s. te Amsterdam. De leden van de bondsraad worden verzocht zo tijdig mogelijk in Amsterdam te komen, om aanwezig te zijn bij de onthulling van de gedenksteen op het graf van kdo A. Veen.

Congres-contributie.

Voor ons Paascongres in Heerlen is de contributie bepaald op f 0.50 per lid, met een maximum van f 25.— voor afdelingen met 50 en meer leden. Betaling op onze postgirorekening 331133.

Radio.

In de Esperanto-uitzending op 1 Febr. a.s. 16.10—16.25 spreekt ons bestuurslid A. v. Haren over: „Ons Paascongres te Heerlen".

Varbado F.L.E.-Amikaro.

Ni petas specialan atenton de niaj distr. kaj sekcio-estraroj por la ciferoj en la jarraporto pri la F.L.E. Amikaro. Ni hontas pri la rezulto. Ni mem spertis, ke estas facile varbi plurajn amikojn.
De nun ĉiu faru ĉion eblan por ke en la kongreso ni povu konstati, ke la varbado fariĝis sukceso.

Membro-administrado.

Sekciaj sekretarioj atentu. Per aparta letero ni jam atentigis vin, ke vi sendu la kvaronjarajn listojn *ne al* Postbus 8002 Asd., sed *rekte al la sekr. de la distrikto,* al kiu via sekcio apartenas.

Libro-Servo.

Wegens de verhoging der posttarieven en de zeer hoge vrachtkosten, zullen van 1 Febr. af a.s. de verzendkosten in rekening worden gebracht.

Een goed voorbeeld.

Onze afdeling „Zaandam" zond een keurig gedrukt jaarverslag. Een jaarverslag dat er mag zijn, waarbij wij niet enkel het keurige uiterlijk op het oog hebben, maar ook de goed geordende en overzichtelijke inhoud, waaruit de activiteit dezer afd. spreekt.

Verzending L.E.

Wegens de verhuizing van de Libro-Servo en ontbreken van voldoende hulp, was het niet mogelijk L.E. van 1 Jan. vóór 31 Dec. te verzenden.
Het Maartnummer van L.E. verschijnt, evenals dit nummer, 'n week vroeger.

AAN DE AFDELINGEN.

Zo juist is verschenen de brochure: Richtlijnen voor het onderwijs van Esperanto op de school, uitgegeven door het Bureau: Esperanto bij het onderwijs, waarbij onze bond is aangesloten.
De afdelingen kunnen bestellen bij de Libro-Servo Amsterdam (W.), Postbus 8002. De colportageprijs is 5 cent. De afdelingen betalen 4 cent per ex. Zorg ervoor, dat deze brochure op iedere schrijftafel komt te liggen van hen, die iets met het onderwijs te maken hebben, alsook van onze vertegenwoordigers in Gemeenteraden en bij de plaatselijke Pers. Allen actief aan het werk voor: Esperanto-onderwijs op school.

Esperanto-Ekspozicio en Heerlen.

La Gazetarservo petas vian atenton! Estas necese, ke ni dum la venonta kongreso aranĝu specialan fakon rilate al gazetarservo. Laŭ ebloj ĉiu klopodu engazetigi ion pri Esperanto aŭ almenaŭ instigu per letero kaj poŝtkarto la Redakcion de sia taggazeto pli atenti Esperanton!
Dum la kongreso ĉiu povos vidi la rezultojn, ĉar al iu gazeto kiu iel ajn prosperigis nian aferon, la sama spaco estos rezervata, kiom ili disponis al Esperanto dum la unuaj tri monatoj en 1947. Ĉiu asociano povas praktike kunlabori kaj zorgi, ke la spaco por sia gazeto estu rimarkinde granda.
Oni nepre sendu al Gazetarservo F.L.E. tri ekzemplerojn el la utiligota gazeto al P. G. v. d. Plank, v. Speijkstraat 48^1, A'dam-W.

PRELEGA SERVO.

Er is kans, dat enkele buitenlanders ons congres te Heerlen zullen bezoeken. Zo mogelijk zullen wij een rondreis door de afdelingen organiseren. Alleen de Afdelingen, die zich vóór 15 Maart aanmelden, komen hiervoor in aanmerking. De onkosten zullen naar het ledental worden omgeslagen.

Junularkomitato „JUKO".
Sekr.: Langereis A 31, Hoogwoud NH.

Door het uitvallen van een regel uit onze circulaire van December is de oproep tot deelname aan het week-end op 8 en 9 Febr. 1947 in de jeugdherberg „Rijnauwen" te Bunnik bij Utrecht, enigszins onduidelijk geworden.
Daarom zij nogmaals vermeld, dat aanmelding voor dit week-end moet geschieden door gelijk met de ingevulde bon, *twee gulden* te zenden aan onze distrikta peranto, *k-do A. M. D. Korff, Bestevaerstr. 123 hs., Amsterdam-West.*

(Vervolg: „JUKO")

Haagse vrienden: opgelet!!

Ons week-end op 8 en 9 Februari in de jeugdherberg „Rynauwen" te Bunnik, belooft een groot succes te worden. Van alle kanten bereiken ons de aanmeldingen voor deze jeugdbijeenkomst.
Wij verzoeken dringend Zaterdagmiddag vóór 6 uur in de jeugdherberg aanwezig te zijn!
De *Haagse* deelnemers stellen zich onmiddellijk in verbinding met *k-do R. van Putten, Celsiusstraat 162, Den Haag,* die de reis vanuit Den Haag naar Bunnik regelt. Daar gezamenlijk reizen een belangrijke reductie op de reiskosten oplevert, melde men zich *vandaag nog* bij genoemden k-do!
Vrienden, tot ziens in Bunnik!

RECENZO.

PLI OL FANTAZIO. Agnes Bogh — Hogsted. Trad. el la Dana lingvo de C. Graversen. 70 paĝa.
Eldono: Dansk Esperanto Forlag.
Estas bedaŭrinde, ke la libreto ampleksas nur 5 noveloj. Car leginte ilin oni deziras legi pli multe de ĉi tiu aŭtorino, kiu estas adeptino de nia lingvo. La rakontoj estas pli ol nura fantazio. Ili enhavas saĝecon pri la homa vivo kaj la verkistino scias prezenti al ni la homajn tragediojn tiaj, kiajn ni konjektas ilin.
Majstre kaj trafe ŝi priskribas la morton de maljuna Stina. Ŝi prezentas al ni la divers-karakterajn homojn; kiel ili juĝas laŭ la ŝajno kaj ne laŭ la veraj (ofte nekonataj) faktoj. La dua novelo tamen ne estas la reala vivo. Ĉi tie la novelistino vere fantazias. Sed eĉ kiam oni ne konsentas ŝian prikribon, oni tamen sentas la profundan signifon de la „enĉiela" renkontiĝo.
La fakto, ke la Literatura Komitato de F.L.E. kontrolis la verkon garantias, ke la gramatika flanko estas bona.
La tradukinto prave aplikis ĉiam la adjektivan formon malantaŭ verboj, kie oni kutime metas adverbon: Li kuŝas kvieta. La enhavo entute estas vere leginda kaj la lingvaĵo bona kaj imitinda. J. van Scheepen.

LIBROSERVO

Postbus 8002 — Amsterdam-W.

Nova originala verko de Stelan Engholm „Vivo Vokas",

rakonto, en kiu ludas rolon la samaj personoj, kiujn oni jam konas el „Infanoj en Torento". Kiu jam ĝuis la simplan rakontmanieron de Engholm, kaj lian modelan, klaran stilon, sendube havigos al si tiun ĉi novan eldonon.
Prezo broŝ f 3.50, bind. f 4.50.

El nia romanserio estas ankoraŭ livereblaj: La Senlingvulo, Patroj kaj Filoj, Fontamara, Kulio, Homoj en milito, Hispana Tragedio, po .... *f* 2.90
La Batalo de L' Vivo (nur broŝ.) *f* 1.60

Jus aperis la 5a numero de
MALGRANDA REVUO (46a),
ĉi foje pli ampleksa ol antaŭe (48 p), kun bonstila enhavo literatura, aktuala kaj popularscienca.
Ni povas liveri ankoraŭ malnovajn numerojn de '45a kaj '46a po *f* 0.50.



ELLA DISTRIKTOJ

AMSTERDAM. Sekr.: Pieter Aertszstr. 83 Z.
La distrikta jarkunveno okazos la 25an de februaro en Krasnapolsky. Komenciĝo, 8.15 precize.
Zorgu ke ni ne kunvenas kun neokupataj seĝoj! G. J. Burgman.

Zamenhofa vespero en Amsterdamo.
La amsterdama distrikto aranĝis la Zamenhofan vesperon pere de la Verda Kabareto. Malgraŭ la malvarmo la vizito estis kontentiga, la salono „de Leeuw" preskaŭ tute okupita kaj kiom ĝojeĝis la ĉeestantoj pri la bonaj skeĉoj, el kiuj klare montriĝas, ke nia Esperanta Kabareto estas sur la bona vojo. Prezenti ion el Esperantio certe estas nefacila tasko kaj tial ne ĉio estis sekvinda. La interpaŭzoj daŭris tro longe sed tre bona estas la ideo, ne ĝeni la esperantistaron per parolado, kies enhavo jam estas tute konata al ili, tre konsiderinda ekzemplo!
Malgraŭ la programo anoncis, ke ĝi okazos tute Esperantlingve, tio ne estas tute vera. Sed certe neniu bedaŭras tion, ĉar la nura ne-Esperantistino kiu kunlaboras en la kabareto, tiom ĉarme kaj nature aktoris, kiom estas postulata al vera aktoro. Ni certe povas gratuli la Verdan Kabareton, kiu en mallonga tempo sukcesis aranĝi aktuaian programon.
La Verda Kabareto en Parizo ne plu estas sola; konkuranto vivas en Amsterdamo kaj ni certe povas fieri pri tia posedo. La sekcioj bone atentu, ke la Verda Kabareto estas preta kunlabori en viaj festvesperoj. *Aktoris:*
K-do A. L. de Bruyn kun lia edzino kiel ne-esperantistino, K-doj G. Oosterbaan kaj B. van Reenen, K-dino W. Bood. Pianludis frato de k-do de Bruyn. Petro de l' Breto.



EL LA SEKCIOJ

AMSTERDAM I. A.L.S.E.
Sekr.: P. Baststraat 12^3.
Kunvenejo: Pieter Aertszstraat 106.
La konversacian vesperon de la 12a de Dec. ni aranĝis rememore al la naskiĝtago de nia Majstro, kiel Zamenhofan vesperon. Niaj membroj D. Appel, S. Aarse kaj F. C. H. du Bois plenumis modestan muzikprogramon kaj k-do Waadenoijen deklamis tri poemojn. Kiel gaston ni invitis k-don de Bruijn, kiu rakontis pri gajigaj momentoj dum Zamenhofaj vesperoj kaj multe kontribuis al la sukceso de tiu festo. La 33 ĉeestantoj honorariis la kvin kunlaborantojn per laŭta aplaŭdo.
W. Dekker.

AMSTERDAM X. „La Espero".
Sekr.: G. v. Ledenberghstraat 37.
Enirinte novan jaron, la estraro de nia grupo deziras al ĉiuj anoj de la asocio kaj grupo, prosperon kaj feliĉon.
En la lastokazinta membrokunsido en 1946, nia membraro elektis k-don Joakman prezidanto. Li anstataŭas nian estimatan k-don D. Muller, kiu pro sia sanstato deziris cedi la prezidantecon. Ni bedaŭras lian decidon, ĉar k-do Muller antaŭ la milito ĉiam estis la motoro, kiu laboregis por nia sekcio kaj nia movado. Li meritas ĉies laŭdon, kaj ni esperas, ke li baldaŭ tute estos resaniĝinta. Tamen, k-do Muller ne restos ripozanta, ĉar li de nun aktivas en la komitato por la konversaciaj vesperoj.
La membroj montru siajn intersiĝojn, kaj venu amase al niaj konversaciaj vesperoj, por ke lia laboro ne estu vana.
Baldaŭ ni okupos nian propran domon, kaj la vigleco fariĝu kiel antaŭ la milito.
J. W. Vogel sekr.

AMSTERDAM XIII „Liberiĝa Stelo".
Sekr.: Westlandgracht 145.
Atentu: Ni kunvenos merkredon 5, 12 kaj 26 febr. en nova ejo, Leimuidenstraat 10, apud Hoofddorpplein (ĉe Lammers).
Jaŭdon 20 febr. ni kunvenos en la ejo Theseusstraat.

GRONINGEN.
La 14an de Decembro ni festis la naskiĝtagon de d-ro Zamenhof. La komitato de la kunlaborantaj sekcioj, G.A.V.E., organizis la festkunvenon. Estis tre agrabla vespero. Membroj de L.E.E.N. kantis, k-do Altena estis la parolinto. Membro de kristana organizo laŭtlegis humoran prelegon, kaj nia teatra grupo ludis komedion, kiu tre plaĉis al la ĉeestintoj.

LEEUWARDEN.
Kun „Frisa Esp. Rondo" de LEEN, nia sekcio festis la naskiĝodaton de Zamenhof. K-do Tjepkema malferme parolis, LEEN-grupo kantis; parolis Wies Steffering, kaj nia sekcio prezentis teatraĵon kaj kanton. Pro la malvarmega vetero sufiĉe da anoj ne ĉeestis.
Je la 3a de Januaro nia sekcio kunvenis en „Het Baken". K-do Stellema rakontis pri abelkulturo (kun lumbildoj) kaj poste parolis pri sia restado en 1937 en Danio (ankaŭ kun lumbildoj) S-ro Veltman de F.E.R.
Do: tre lerniga vespero, pro kio ni kore dankas la parolintojn. La presservantino, C. C. M. Rijpstra-Timmermans.

MAASTRICHT „Por Alta celo".
Sekr.: Heugemerweg 14.
La 2?an de Decembro kunvenis nia sekcio por elekti novan estraron; bedaŭrinde ĉeestis nur 6 membroj. Sed kamaradoj, tio ne povas resti. Nepre vizitu regule la kunvenojn aŭ konversacio-vesperojn, por la bono de nia esperanto-movado La estraro nun konsistas el K-doj H. P. Bock, prez.; Dijkstra, kas., kaj Huysman, Heugemerweg 14, Maastricht, sekr. Pro la multaj laboroj por nia sekcio ni ŝuldas dankon al K-do Margaroli.

ZAANDAM-ANTAŬEN. Sekr. Emmastr. 28.
La 3an de Januaro ni okazigis nian kutiman jarkunvenon. Proks. 40 gemembroj ĉeestis, inter kiuj kelkaj gastoj. Post la malfermo de la prezidanto J. Vis, la sekretario kaj la kasisto klarigis la al ĉiuj membroj senditajn jarraportojn. Post la paŭzo dum kiu ni trinkis kafon, la gemembroj parte uzis la okazon por instigi kaj fari sugestojn. Unuanime la kunvenintaro akceptis la jarraportojn, kio signifas konsekvence, ke la estraro kalkulas je ĉies kunlaboro por la planoj dum la nuna jaro 1947.
Por la estraro elekto oni kandidatigis la nunajn estraronojn kaj kelkajn aliajn k-dojn.
Post priparolo de la kongreso en Heerlen kaj kelkaj deziresprimoj la prez., sciigis pri la jenaj datoj de niaj klub-kaj konversaciaj vesperoj nome:
la *5an de Febr.* k-do Brondijk parolos pri gramatikaj aferoj,
la *19an de Febr.* k-do de Bruin el Amsterdam pri Statistiko. Ambaŭ lekcioj estos tre lernigaj, do la membroj venu al Oostzijde 59.

ZUTPHEN. Sekr.: Dieserstraat 6.
Finfine ni en Zutphen restarigis la sekcion de nia asocio. Tuj post la liberiĝo en 1945 ni fondis t.n. „unuecan grupon". Kvankam en ĉi tiu grupo regis bona harmonio kaj kunlaboro, al kelkaj ne kontentigis la malhavo de kontakto kun landa organizo. Ni likvidis la „Zutfena Esperanto-Klubo'n. Kaj sukcesis fondi sekcion el la ĝeneralaj F.L.E.-anoj.
La jena estraro elektiĝis:
Prez.: K-do H. W. Altena, Hellenraetplein 9;
Sekr.: K-do H. J. Kemperman, Dieserstr.6;
Kasisto: K-do J. Peters, Marschweg 145;
Bibliotekisto: K-do J. J. Kroet, Laarstraat 11.



S.A.T. RONDOJ

AMERSFOORT.
Sekr.: Seringstraat 14.
Dimanĉe la 22an de Decembro okazis kunveno de nia rondo, ĉe k-do Boon. Ĉeestis 9 membroj. Estis tre agrabla kunveno.

AMSTERDAM.
La 23an de Februaro en konstruaĵo „De Archipel" Minahassastraat 1. K-do J. v. d. Stolpe enkondukos la temon „Ĉu Germanoj povas esti anoj de S.A.T."
La 30an de Marto en konstruaĵo *„De Valk"*, Valkenburgerstraat 105. K-do B. J. Bishoff enkondukos la demandon „Ĉu tamen for la batalilojn?"

ARNHEM.
Ni kunvenos **dimanĉon la 16an de Februaro,** matene je la 10.30a h. precize, ĉe k-do Henstra, Taklaan 5. K-do Saaltink parolos pri: „Militrifuzado". Venu ĉiuj! Nia grupo nun nombras 26 anojn. La loka peranto: A. Henstra.

DEN HAAG.
La 13an de Januaro k-do Varkevisser parolis pri la „Juda problemo" en „Volksgebouw". K-do Hack projektis lumbildojn pri Palestino. Ni intencas regule aranĝi alternmonate niajn kunvenojn, do la sekvonta en Marto. Ni zorgos pri kulturaj vesperoj!
Plue ni atentigas la membrojn pagi la kotizon 1947. Jam 2 Sekciaj perantoj funkcias. Ĉiu Sekcio en Hago nepre elektu peranton, por ke la afero glate iras.
Al ĉiuj konatoj feliĉon kaj prosperon en '47. V. peranto por Hago.

ROTTERDAM.
„LA HOMA FELIĈO", jen la temo de nia **februara** S.A.T.-kunveno, okazonta la **16an** en Rusthoflaan 53. K-do Kooppenjan lekcios. Diskutado estas dezirata. Venu grandnombre kaj nepre antaŭ la 10.30a horo.

RADIO

La 14an de Febr. 1947 de 16.10—16.25 parolados A. v. Haren en elsendo de V.A.R.A. pri „Het Paascongres v. d. Bond v. Arb. Esperantisten".
La **14an de februaro 1947,** vespere de 19.15 ĝis 19.30 h. parolados Sro C. P. Brakké, sekr. de la Ned. Kristana Esp. Unuiĝo, antaŭ la mikrofono de NCRV, Hilversum 1, ondolongo 301 m.

V.A.R.A.-elsendo okazinta 14-12 1946.
Ni kore dankas la eksterlandajn esperantistojn, kiuj alportis gravan subtenon al nia laboro ĉe V.A.R.A. Hilversum, Nederlando, per siaj leteroj al tiu ĉi radio-stacio. Precipe el Anglio kaj Danio venis surprize multaj leteroj de danko kaj aprobo. Via kunlaboro grave kontribuos al plioftigo kaj pligrandigo de niaj elsendoj.
Ankaŭ la parolintoj A. L. de Bruyn kaj W. F. Kruit dankas pro la laŭdaj vortoj adresitaj al ili. Asocio de Lab. Esp. F.L.E.



ANONCOJ

FILATELISTOJ!
Sendu 50—100 diversajn p.m. de via lando, kaj mi sendos saman kvanton de Brazilo. Skribu al s-ro Isaltino Silveira Filho.
Rua Santa Rita 377, Juiz de Fora
Minas Gerais, Brazilo.

*

K-do F. Arbergs informas siajn korespondantojn pri sia nova adreso:
Piebalgas iela No. 1-2, Riga, L.P.S.R. Letonio.